

ESPERANTO

TRIUMFANTA

ELDONANTOJ:
D-ro L. Zamenhof, Warszawa (Varsovio).
W.M. Page, adv., Edinburgh.
E. Archdeacon, ĝen. sekr. de Tour.Club de France, Paris.
Teo Jung, Köln (Kolonjo).
G. van Heek, Hengelo.
Frans Schoofs, Antwerpen.
P. v. Medem, bankdirektoro, Kaunas (Kovno).
Ĉef-redaktoro: Teo Jung.
Kun-redaktoro: M. Butin.
Literatura redaktoro: Zanol.

ADMINISTREJO:
Köln-Horrem, Reinlando, Germanio.
Germ. poŝtĉeka konto 70865, por Teo Jung, Köln-Horrem.
Manuskriptojn oni skribu sur unu flanko de la papero. Skribu ĉion legeble, se eble per maŝino. Por resendo aŭ respondo aldonu resp.-kup. aŭ poŝtm. Adresu ĉion al s-o Teo Jung, Köln-Horrem, Germanio.

ABONEJOJ.
Bulgario: Georgi Ĥr. Gaŝevski, Bul. Marie Luiza 46, Sofio.
Ĉeĥoslovakio: Otto Sklenčka, Hradec Kralové.
Estonio: Est. Esp. Unuiĝo, postkast 6, Tallinn.
Finnlando: O.Y. Movado A/B., Kasarminkatu 20, Helsinki.
Hungario: Pabŝo Balkanyl, Hajos-utca 15-II-2, Budapeŝto VI.
Litovio: Paŝlo v. Medem, Smellu g-ve 12, Kaunas (Kovno).
Polio: Adolfo Oberrotman, Krak-Przedm. 10, Warszawa. — Pola Esp. Servo (Fr. Prengel), Kordeckiego 1a, Bydgoszcz-Bromberg.
Usono: The Esperanto Service Corporation, 800 Fifth Avenue, New York City.

JARABONO:
8 dolaroj, 6 guldenoj, 10 svedaj kronoj, 12 avisaj frankoj, 12 ŝilingoj, 12 danaĵ aŭ norvegaj kronoj, 12 pesetoj, 20 francaj aŭ belgaj frankoj, 30 ilroj, 70 finnaj markoj, 70 ĉal. kronoj, 250 hung. kronoj, 600 aŭstr. kronoj, 1600 pol. markoj. — Ĉiu pagas en la valuto de sia propra lando per naciaj bankbiletoj en rekomendita letero, aŭ per germanaj bankbiletoj aŭ ĉekoj sur germanaj bankoj laŭ la taga kurzo. — Balkanaj kaj baltaj ŝtatoj pagu 60 germ. mk., Estonio 40 germ. mk. Aliaj landoj pagu per dolaroj aŭ ŝilingoj, kiuj estas aĉetebaj ĉe ĉiu banko kaj monŝanĝejo. — Ne estas necese pagi tutan jarabonon je unu fojo. Oni sendu laŭvole altan sumon, kaj ni liveros tiom da numeroj, por kiom valoras la pago. Abonantoj, kies abono estas finiĝonta, ricevas ĝustatempe admonilon. — Abonoj povas esti komencataj per iu ajn numero. — Germanoj abonon ĉe la poŝto (Postzeitungsaliste, 13. Nachtrag, Ergänzungsheft 3, paĝo 280, sub „Kunstsprachen“), kvaronjare 18 mk., aŭ rekte ĉe la administrejo Köln-Horrem, Germanio, (ĉiu numero banderolita 1,35 mk.).

ANONCOJ
kostas po cm² (kvadratemetro) 1,50 germ. mk.; ĉe grandaj aŭ ripetataj anoncoj rabato ĝis 30% (por abonantoj kaj esp. firmoj kromrabato de 20%). ANONCETOJ kostas por 1-2 foja enpresado kaj 25 vortoj la prezon de 5 n-oj de ET, 5 resp. kup. aŭ 6 germ. mk.; por 3-5 foja enpresado ni kalkulas la duoblon. Ĉe rektaj abonantoj ni deprenas la pagon por anoncoj de la abonkonto (5 n-oj). — Familiaj anoncoj (naskiĝo, ŝanĝiĝo ktp.) kaj anoncoj pri gravaj esp. okazintaĵoj (ĉefkunveno, fondiĝfesto ktp.) estas unufoje enpresataj senpage. En korespondaj anoncoj ni fu. srekas ne-necesajn kaj malnecajn.

Numero 55. Edinburg, Paris, Köln, Hengelo, Antwerpen, Warszawa, Kaunas, 23. Okt. Jaro 1921.

La Sukceso.

Kiu volas, povas. Spite grandajn malfacilaĵojn ĉiuspecajn, „Esperanto Triumfanta“ sukcesis en relative mallonga tempo konkeri al si la esperantistatan mondon.

Dekoj monatoj pasis plene de intensa, energia laboregado. Kvindek kvin numeroj de ET aperis, deponi la 20. nov. 1920 en regula sinsekvo ĉiusamaĵne, eĉ dum la kongresmonato.

En la komenco la fondiĝo, mia frato, devis ne nur redakti, sed eĉ mem komposti kaj mane presi la ĵurnalon, ankoraŭ ne havante modernan maŝinon kun motoro nek sufiĉan helpistaron (tiam ni okupis nur unu kompostiston kaj unu lerniston); la nombro de la abonantoj estis malgranda, ĉar la esperantistoj ne tuj fidis al la entreprenon, jam ofte trompate de nefakuloj, kiuj promesis orajn montojn sed poste neniel povis plenumi siajn promesojn; cetere la fakto, ke ET aperis en provinco apartenanta al Germanio — lando tiam bojkotata de la duona mondo — ankoraŭ pli malhelpis la entreprenon. Do precipe la unuaj monatoj estis plenaj je laborego, atendado, maltrankvilo, sufero. Ne sufiĉis la tagoj, eĉ de la nokto ni devis ofte pruntepreni la dumtage mankantajn horojn. Sed iom post iom la abonantaro kreskis, eĉ anoncoj alvenis. Kaj kiam ni en junio de nuna jaro sukcesis aĉeti modernan presmaŝinon kun motoro, ni povis ekspiri.

De nun mia frato dediĉis sin preskaŭ tute al la redakto kaj koresponda laboro por ET, kiu kreskadis de semajno al semajno. Intertempe ni povis dungi pliajn helpantojn: ekspedistinojn, kies laboron dum kelkaj monatoj estis plenuminta nia fratino-studentino en siaj liberaj horoj, du pliajn kompostistojn, unu presiston kaj duan lerniston, tiel ke nia presejo krom ni du fratoj nun okupas sep personojn.

Ni ĝojegas trovi konstaton, ke deponi du monatoj (aŭgusto kaj septembro) la enspezoj el ET jam plene sufiĉis por kovri ĉiujn laŭtarifajn presajn kaj afankajn kostojn; eĉ por la redakcia laboro restis ankoraŭ modesta salajro. Sed en la antaŭaj monatoj la defikto de ET atingis entute la sumon de ĉ. 50 000 germ. mk. Kompreneble ni ne estus povintaj rezigni tiel konsiderindan sumon, se ni ne posedus ankaŭ germanlingvan ĵurnalon aperantan trifoje en la semajno; tamen la maltrua gajno ne estis bagatelo por ni. Sed

mi estas konvinkita, ke ET sub la sperta gvidado de mia frato plue evoluos kaj iam reenspezigos ne sole la estontajn kurantajn kostojn, sed eĉ la tutan estintan defikton.

Tiu sama konvinko instigis mian fraton, pli ampleksigi kaj plibeligi ET komence de la hodiaŭa numero, kvankam tio postulas denove konsiderinde pli grandajn laborojn kaj kostojn. Sed per tio ET fariĝas efektive la plej valora gazeto esperantista, kiun baldaŭ nenu vera esperantisto jam povos malhavi.



ET en gazet-kiosko.

ET nuntempe estas poekzemplere vendata en ĉ. 80 lokoj de pli ol 20 landoj. La ĉi-supre videbla kiosko en Düsseldorf (Germ.) estas gvidata de militdefektulo, kiu vendas ĉiusamaĵne 25 ekz. de ET, plejparte al esp. laboristoj.

Grandan apogon donis al ni la preteco de diverslandaj konataj samideanoj fariĝi kuneldonantoj de ET, inter ili la frato de nia Majstro mem (vidu la nomaron de la eldonantoj maldekstre de la titolo). Per tio nia malfacila entreprenon ricevis materialan kaj antaŭ ĉio firman moralan bazon, sur kiu ni povas trankvile daŭrigi ĝin.

Ni jam ne timas la estontecon. Ni nur elkrede deziras, ke ĉiu celkonscia esperantisto senescepte ekkonu la gravecon de grandformata, ĉiusamaĵna, ilustrata esperanta ĵurnalo kaj subtenu nin per sia abono kaj per varbado de anoncoj de seriozaj

firmaj, tiamaniere kunhelpante, ke nia sukceso ne estu nur momenta, sed daŭra, por la bono de nia movado.

Helma Jung.

Rim. de la ĉef-red.: Mia frato certe pravas parolante pri la grandaj malfacilaĵoj, kiuj kontraŭstaris al nia entreprenon. Kelkfoje la laboro fakte superis niajn fortojn. Tamen ni venkis ĝin, — kaj jen la sukceso estas nia. Sed mi ne volas pasigi la okazon, ne atentigante ankaŭ pri la granda merito, kiun havas mia frato kaj miaj kunhelpantoj kaj kunlaborantoj je tiu sukceso. Senstrupule mia frato konsentis elspezi unu milion da markoj post la alia por la komenco ja tre dubinda entreprenon de granda esperanta ĵurnalo, fidele li kunhelpis en ĉiuj laboroj, dum mia vojaĝo al la kongresoj de Dresden kaj Praha li eĉ redaktis ET je ĉies kontento. Li speciale meritas la dankon mian kaj de la tuta legantaro. Pluan dankon mi ŝuldas al mia fratino, kiu dum kelkaj monatoj en siaj liberaj horoj prizorgis la ekspedadon, al mia amiko G. Ajul, la redaktanto de la Recenzejo, kaj al ĉiuj aliaj kunlaborantoj kaj amikoj de ET en ĉiuj landoj. Ke ili restu fidelaj al la de mi komencita entreprenon, kaj ke ET gajnu ankoraŭ multajn milojn da novaj abonantoj kaj aĉetantoj, jen mia kordeziro, kies plenumo samtempe estus la plej bona rekompenco por mia laboro kaj penoj.

T. J.

Esperanto en 29 bulgaraj gimnazioj.

Gravan sukceson jam atingis la esperanta movado en nia lando. Ĝis hodiaŭ estas oficialigitaj ŝtatinstruistoj de Esperanto en 29 realaj gimnazioj, kiuj instruos Esperanton dum la kuranta jaro. Tiu ĉi sukceso estas ja natura sekvo de nia pasintjara propagando kaj laboro antaŭ la Ministrejo de la Popola Instruado, per kiu laboro ni atingis la fakultativan instruadon de Esperanto en la realaj gimnazioj. Sed kvankam la nova leĝo estas aplikata deponi la venonta 1922/1923 lernejo, la Ministro de la Popola Instruado s-o St. Omarĉevski konsentis oficialigi instruistojn ankoraŭ dum la komencanta lernejo, kaj tial li demandis de la Societo* la personojn, kiuj taŭgas esti instruistoj. La Societo siaflanke sin turnis al siaj membroj en la tuta lando per cirkulero,

petante ilian konsenton instruistigi. Ĝis la fino de septembro alvenis konsentoj de 29 personoj, el kiuj ses estas en Sofio kaj la ceteraj en la diversaj urboj po unu. Ili estis prezentataj al la Ministrejo kun peto por oficialigo. Kaj ĝi respondis per letero de 7. okt. nunjara, ke la prezentitaj personoj per ordono n-o 4841 de la sama dato estas oficialigitaj kiel lektoroj por Esperanto.

Ni havas jam oficialajn instruistojn en 29 gimnazioj, kiuj estas la granda plimulto el ĉiuj ekzistantaj en Bulgario gimnazioj, kaj tiu ĉi nombro pliĝos, ĉar ni preparas jam duan nomaron de kandidat-instruistoj. Nur kelkaj gimnazioj tiun ĉi jaron restos sen esperantaj lektoroj.

Laŭ postulo de la Ministrejo estis ankaŭ el-laborita de la Societo projekto-lerneplano por la instruado de Esperanto en la realaj gimnazioj. La prezidanto de Bulgara Esperantista Societo s-o G. Aktarĝev estas ano de la komisiono de la Ministrejo, kiu estas komisiita ellabori la regularon por apliko de la nova leĝo.

Tio estas granda ekuŝo por nia movado, kiu entuziasmigiĝis ĉiujn batalantojn tra la tuta lando, ĝi estas forta sonorilegsono, kiu jam vekis eĉ delonge dormantojn por nova laboro kaj venko.

Sed kvankam granda estis la merito de bulgara esperantistaro batalinta por atingi tiun ĉi sukceson, ne malpli granda estas ankaŭ la merito de la Ministro de la Popola Instruado, la senlaca kaj energia s-o Stojan Omarĉevski, kiu kvankam neesperantisto, kvankam ne parolante la lingvon, tamen per sia klara vido antaŭvidante, ke la estonto de la homaro dependas multe de la akcepto de unu internacia lingvo, kiu dank' al sia progresemeco favoras ĉiun kultursignifan movadon, faras ĉion eblan helpi ankaŭ al la esperantista movado en sia lando. Kaj multe el siaj lastaj sukcesoj la bulgara esperantistaro dankas al li. Lia nomo estos enskribita en la historio de la esperanta movado en Bulgario per oraj literoj.

D. Simeonov.

* Bulgara Esperantista Societo.

La plibonigo kaj pligrandigo de ET

sursargis al ni novajn laborojn kaj kostojn. Zorgu vi per varbado de abonaj anoncoj, ke ni povu daŭrigi nian entreprenon en la nuna efika formo!

La tri Fundamentaj Reguladoj.

La unua el la du plej urgaj taskoj de la esperantologio. De Eugen Wüster.

La tri regulojn, pri kiuj ni intencas paroli, ni nomis fundamentaj, ĉar, kiel jam dirite kaj ĉi tie nur klarigeble sed ne pruveble, antaŭ ilia efektiveco en la ajn maniero la ellaboro de konsekvenca vortoprovizo ne estas ebla: ili estas necesaj por kontentigi la „praktikan postulon de interkompreno“.

I. Forigo de la gramatika hibrideco de kelkaj tra oftaj vortelementoj.

La principo, al kiu la modernaj helplingvoj eĉe dankas sian facilon, estas la konstanteco, t. e. la neŝanĝigo, de la formo kaj ideo (signifo) de la vortelementoj en ĉiuj kombinoj. Kontraŭ la principo de ideo konstanteco pekas la hibridaj vortelementoj, t. e. tiaj vortelementoj, kiuj liveru nomojn por la samaj serioj de ideoj (konceptoj) kaj estas uzataj aŭ de la diversaj aŭtoroj aŭ eĉ de la sama aŭtoro en la unuopaj kunmetitaj (plurelementaj) vortoj kun malsama vortkaraktero.* Ĉar la specifika karaktero de vorto, t. e. la ideo ento (ĉe substantivoj), la ideo kvalita (ĉe adjektivoj) kaj la ideo fari (ĉe verboj) estas ideo, nome la plej generala ideo gramatika, la gramatika kategorio.

La malutilo de tiuj hibridaj vortelementoj konsistas en tio, ke ili donas du resp. tri vortoseriojn (-familiojn) en si meme konsekvenca kon-

struitajn, kies samformaj membroj ne havas la saman signifon kaj kies samsignifaj membroj male havas malsaman formon. Ekz-e en unuj kombinaĵoj (fiksa, fikseco) estas preferata fiksa = fiksa = proksimume (la preciza signifo ĉe tiu esploro ja estas indiferenta) firm(a), kio rezultigus la serion fiksi [esti fiksa(a)] = firmi, esti firma, fiksa(e)o = firm(e)co, fiksaĵo = firmaĵo, fiksig(i) = firmigi, fiksig(a) = firmiga, fiksigo = firmigo, fiksigeco = firmigeo, kvalito firmiga ktp; en aliaj kombinaĵoj (fiksi, fikso, fiksil, fiksit) estas preferata fiksa = fiksi = firmigi, kio rezultigus la samforman kun la pli supra sed alisignifan serion fikso = firmigo (antaŭe fiksigigo), fiksa = firmiga (antaŭe fiksig(a)), fiksaĵo = firmig(i)ĵo (ant. fiksig(a)ĵo), fikseco = firmigeo (ant. fiksig(e)co), fiksigi = igi firmigi (ant. igi fiksigi), fiksigeco = kvalito igi firmigi (antaŭe kvalito igi fiksigi) ktp. Se oni ne volas renversi la utiligan principon de la ideo konstanteco, oni ja povus nei la hibridecon de fiksa kaj ĝiaj similaĵoj dirante, ke en kunmetaĵoj kun tiuj vortelementoj la adjektivo-verboj (por defendi adjektivan vortkarakteron; fiksi-) signifis igi . . . a aŭ (por defendi verban vortkarakteron) la verbo-adjektivoj (fiksa-) signifis . . . ita. Sed tiam oni agas kontraŭ la tre grava principo, nome kontraŭ la konvencio de la interelementa rilato de -i resp. de -a al la antaŭiranta vortelemento; ĉar laŭ la lingvuzo la signifo de . . . i estas, se . . . montras adjektivan radikon, „est(i) . . . a“ (necesi, pravi, gravi) kaj lafoje „agi . . . e“ (rapidi); kaj la konvencia signifo de . . . a estas, se . . . montras verban radikon, proksimume = . . . anta (brila, flua, interesa). Do restas, por esti samtempe konsekvenca kaj praktika, decidiĝi por unu el la du vortkarakteroj kaj sekve serioj; se oni prenas la duan, oni tiam ne povas ne diri

kiel *Kabe* („fiksa astro“) kaj la angla lingvo fiksa (ĉiam ne tre oportune) por „firma“. Same estas pri fals-.

Simile okazas konkuro inter la substantiva kaj verba ideoj ĉe aloj-, ekstrakt-, dekokt-, plant-, produkt- (aŭ = produkti) kun produkt(a)ĵo, aŭ produkto = elfaraĵo, de kiu oni ja ankaŭ povas devenigi per aldono de la verba ideo resp. ĝia signo -i samsignifan kiel antaŭe produkti, sed kiu estas malpli praktika pro aliaj kaŭzoj), sem-, ŝvit- (aŭ = ŝvito = eligitaĵo kun ŝviti aŭ = ŝviti kun ŝvitaĵo); konkuro inter la substantiva kaj adjektiva ideoj okazas ĉe solen-. Adjektiva kaj verba vortkarakteroj ordinare liveras seriojn preskaŭ identajn.

Me malpleje pro tio, ke la konsekvencaj vortaristoj klopodas eviti hibridecon de la vortelementoj laŭ la kombinaĵoj, oni povas klare sekvi la laŭaŭtoran batalon inter la konkurantaj vortkarakteroj en la vortolibroj kun alfabeto Esperanto-parto: kiel ekz-e *Kabe* al la unua aperanta vorto de familio, do al la vortelemento kelkfoje donas alian vortkarakteron ol antaŭe *Jürgensen*, kiel ankaŭ *Verax* kaj *Boirac* ree elektas la vortkarakteron ĉiufoje tiel, kiel ili opinias, ke estas plej nature kaj plej taŭge por la farado de la tuta vortfamilio; kiel ĝenerale ĉiu verkinto de nova kolektaĵo de esp-aj vortfamilioj, se li ne tute malzorgas tiaĵojn, rilate la vortkarakteron de determinitaj vortelementoj decidus laŭ sia bontrovo.

Kaj tamen, se iel ajn pri la ideoj de la vortelementoj, antaŭ ĉio pri la vortkaraktero, la plej generala ideo, devus regi akordo! Tial ankaŭ jam *Hector Hodler* en sia artikolo *Novaj Perspektivoj* postulis zorgan fikson de la vortkarakteroj.*

* Esperanto 1919, p. 42. En *Esperanto-Praktiko* 1919, p. 105, d-ro Plagg e ripetis tiun postulon.

(Daŭrigota.)

* Oni difine ne povas diri, ke ili diferencas „nur“ per la vortkaraktero, ĉar ili ja estas ideoj malsamecaj, kiuj rilatas unu al la alia kiel la determina vorto de kunmetitaĵo al tiu lasta; oni difine ekz-e produkt unue kiel verban kaj poste kiel substantivan radikon.

Esperanto en Transilvanio (Rum.).

Ni esperantistoj en Rumanio jam de longe hontinte legas en ET la artikolojn, kiuj raportis pri la esp. vivo en diversaj landoj, nur pri ni silentegis. Ĉu nur ni ne laboras, ĉu nur ni restas malantaŭ ĉiu alia lando? Eble jes, eble ne; — sed vere, dum la mondbuĉado la tuta esp. movado malvivadis en nia lando. Eĉ la ĵus denove komencita laboro ne ekiris sub bonaj signoj, ĉar en Targo (Targu-Mureș), kie s-o pastro A. Ĉe gvidis multe da bonsukcesintaj kursoj, kaj kie jam ekestigis vigla esp. vivo sekve de fervora, senlaca helpado de s-o bankdirektoro J. Halasz, la militistaj estraroj malhelpis ĉiun agadon, fermante la kunvenojn de l' targaĵ samideanoj.

Nia agado havis pli grandan sukceson en Cluj (Kluj), kiu estas la ĉefurbo de Transilvanio kun pli ol 80 000 loĝantoj kaj kun led-, sukerajtabak- kaj alumet-fabrikejoj. Post la kurso, al okazis en julio kuranĵara, la estintaj kursanoj aliĝis al la malnova loka esp. grupo, renovigante ĝin kaj elektante novan estraron (d-ro Chirilla, s-o Morariu, s-o Kardoș kaj s-ino Poszler). La renoviginta klubo konsistas el rumanoj, hungaroj kaj germanoj, kaj ili en paca kompreno tre bele laboradas.

Ankaŭ la klua situacio estas pli favora por nia afero. La „Kelel Ujsag“ (Orienta Gazeto), la plej grava hungarlingva ĵurnalo aperanta en Cluj, ĉiusemajne enhavas pri- kaj por-esperantajn artikolojn.

La rezulto de l' klopodo de s-o Ĉe estis, ke lia episkopa moŝto grafo Gust. K. Majlath ankaŭ aliĝis al nia movado, kaj li sendis entuziasman saluti eterojn al la XIII-a en Praha kaj al la Graz'a kongreso, en kiuj li raportis, ke li enkondukis Esperanton en la seminaro en Alba-Julia.

Ankaŭ grava venko estis, ke oni povis konvinki la Komercan Ĉambro de Cluj pri la graveco de Esperanto kaj la Ĉambro en sia komitat-kunsido de 8. julio 1921 unuvoĉe decidis ĵenon (la decido havas n-on 1000/1921):

1. La Ĉambro esprimas la deziron, ke la lingvo Esperanto estu alprenata tutmonde kiel oficiala universala komerca lingvo, kaj direktas alvokon al ĉiuj komercaj kaj industriaj rondoj por ellerni tiun lingvon.
2. La Ĉambro organizas specialajn kursojn por komercistoj kaj meĥistoj kaj por sia oficistaro.
3. La Ĉambro decidis enkonduki la oficialan uzadon de Esperanto en sia korespondo kaj administrado tuj post kiam ĝi havos oficialon kapablan.
4. La Ĉambro proponas al la tutlanda komerca kaj industriala Ĉambro fari similan decidon.

Heveŝi m. p. Balazs m. p.
prezidanto. sekretario.

En novembro okazos nova esp. kurso kaj, ĉu vekti la intereson de l' granda publiko, oni aranĝos en Cluj grandan esp. ekspozicion. En tiu aranĝado multe helpas al ni s-o Emilio Isaac, la ĉef-inspektoro de l' artoj por Transilvanio kaj fama rumana verkisto. *Riu.*

Jarkunveno de Hungarlanda Esperanto Societo.

La ĵara ĝeneralkunveno de Hung. Esp. Soc. okazis en la Socia Muzeo de Budapeŝto la 9. okt. Jam la 8-an vespere kunvenis pli ol 50 samideanoj en ĉambro de kafejo Kovacs. Parolis tie s-anoj d-ro Lorand, dir. Perenyi, Baghy, Schwarz (pri esp. vivo en rusa militkapiteco) kaj Balkanyi.

La 9-an antaŭtagmeze en la feste ornamita ĉambrego de Socia Muzeo s-o d-ro Aleksandro

La Senlingvulo.

Rakonto de Vladimir Korolenko.

Rekomendita de Esperantista Literatura Asocio.

Tradukita laŭ la 8-a rusa eldono kun permeso de la aŭtoro

Maria Ŝidlovskaja.

(87-a daŭrigo.)

Kvazaŭ ŝtonigita li haltis antaŭ la kadavro, faris signon de kruco kaj rapide kuris por kun vizaĝo trolblanka, kun terurita duonefrenetaj okuloj . . . eble pro nevenkebla korporemo, eble ankaŭ pro timo fariĝi atestanto . . .

Kion li dirus, li, senpasporta senlingvulo, al la juĝistaro de ĉi tiu malbenita lando?

En la sama tempo vidis Mateon la ĝardenan gardiston, kiu oscedante, etendante la rigidigitajn membrojn, eliris el sta budo. Li miris pri la stranga kostumo de la altkreska viro, konjektis, ke verŝajne lin li vidis nokte apud la kaĝego de lupoj kaj longe poste li kun mirego ekzamenis sur la malseka sablo de la vojeto la postesignojn de la grandaj botoj de la Loziŝcano.

XXII.

La senlaboruloj de Nov-Jorko estis decidintaj aranĝi meeting'on en la sama antaŭtagmezo. Frua matena horo estis elektita, por ke la manifestacio atentigu tiujn, kiuj mem rapidas al laboro en kontorojn, fabrikojn, laborejojn.

Pri la antaŭstaranta meeting'o oni jam antaŭ semajno presigis en gazetoj, anoncis ĝian programon, la nomojn de la oratoroj. Oni antaŭvidis, ke la homamaso povos „rompi la ordon“, oni intervjuadis la policedirektoron kaj la gvidantojn de la laborista movado.

Gazetoj de borsuloj kaj de Tammany-Hall mal-laŭdegis la agitantojn, certigante, ke nur alilanduloj kaj maldiligentuloj kaj drinkemuloj restas sen laboro en ĉi tiu libera lando.

Glesswein malfermis la kunvenon. Ĉeestis preskaŭ 100 personoj. D-ro Glesswein, kiel ĉiam, elokvente parolis precipe pri tio, ke la mokita idealismo nun jam montriĝas praktika afero kaj ĉia praktika afero venkas nur per idealismo. Post akcepto de raportoj de la sekretario, kasisto, bibliotekisto kaj de raportoj pri la posikongresaj festoj okazis noveleto de l' estraro: prez. d-ro Glesswein, kiu de la fondiĝo de la societo estas ĝia prezidanto, kas. E. Tolnai, bibl. Gutmann, subprez. d-ro Kalocsaj, Nagy-Molnar, prof. Mihalk, sekr. d-ro Mezei kaj f-ino T. Tamas, kaj multaj aliaj komitatanoj. Laŭ propono de d-ro Glesswein oni elektis honoraj prezidantoj s-ojn d-ron Bela Racz, d-ron L. Lorand, d-ron Patai kaj Bela Szasz.

Posttagmeze okazis kabaredo aranĝita de la ERA-grupeto.



Hispanaj samideanoj dum ekskurso legantaj ET.

La bildo montras la esp. grupon de Tarrasa en Hispanio kun ĝia prezidanto s-o Chaler dum ekskurso.

Esperanto-Budo

ĉe la Mondserva Ekspozicio en Liverpool (3.—16. okt.).

Okaze de tiu ĉi grava ekspozicio en Liverpool (Angl.), la loka grupo organizis budon en la internacia sekcio, kie estis elmontrita ĉia speco de esperantaj. Krom la ordinaraĵ propagandiloj, oni disdonis 10 000 ekzemplerojn de speciala folieto, kiu avizis la publikon pri la lastaj sukcesoj de Esperanto.

Laŭ propaganda vidpunkto la budo bonege sukcesis. Oni vere povas diri, ke ni faris grandan impreson ne nur sur la popolamason, sed ankaŭ en oficialaj rondoj. Ni jam havas rikoltojn. Kursoj por poŝtofciistoj tuj komenciĝos en la urbo sub la gvidado de s-o Applebaum kaj pasiro Primavesi O. S. B.; ankaŭ sub la aŭspicio de la „Workers Educational Assn“ kurso ĉe la Universitato (Nile Street), kiun instruos s-o R. Prys Griffiths. La Edukada Komitato de la urbo daŭrigas la kurson ĉe Oulton Senler School, kiun gvidas s-o G. Rhys Griffiths, prezidanto de la loka grupo.

Oni ricevis dum la dusemajna daŭro de la ekspozicio multajn demandojn pri la esperanta movado, kaj oni ankaŭ havis viziton de multaj esperantistoj, kiuj ne jam aliĝis la klubon.

Je apartaj tagoj la ĵenaj samideanoj faris paroladetojn: S-o J. D. Applebaum, pastro Primavesi O. S. B., Eric Mawson B. Sc. el Liverpool, s-o John Merchant, vicprezidanto de la BEA el Sheffield kaj aliaj.

La lt.-kolono J. Pollen C. I. D., I. C. S., faris paroladon antaŭ granda ĉeestantaro vendrede la

La laboristaj gazetoj asertis la malon, samtempe alvokante al indeco, ordo kaj respekto de la leĝoj. „Ne donu al la kontraŭpartianoj pretekston kulpigi vin pri senkulturneco“, skribis la konataj gvidantoj de la laborista movado.

La gazeto „Sun“, unu el la plej disvastigitaj, promesis la plej detalan priskribon de la meeting'o en ĉiuj ĝiaj fazoj, por kio ĉiun duonhoron estis aperonta speciala aldono. Unu el la raportistoj estis tiucele sendita frumatene, por doni la noton: „Centra Parko antaŭ la komenco de la meeting'o“.

La sukceso lin favoris. Antaŭ ĉio, ĉirkaŭvagante en la labirinto de la parko, li kunpuŝiĝis kun Mateo kaj tuj alcelis lin per sia fotografilo. Kaj kvankam Mateo rapide foriris, la raportisto havis la tempon por kapti momentan fotografadon, al kiu li intencis aldoni ĵenan surskribon: „La unua senlaborulo, veninta por la meeting'o“.

La imago pentris al li, kiel eluzos ĉi tiun figuron la kontraŭlaboristaj gazetoj: „... la unua aperis iu sovaĝulo en fantazia kostumo. Ne por tiaj individuoj nia lando ekzistas“.

Poste la viglaj okuloj de la raportisto rimarkis en la arbodensejo la pendantan kadavron. Oni devas esti ĵusta por la gazeta sinjoro. Lia unua penso estis, ke la malfeliĉulo eble ankoraŭ vivas. Do, alkurinte al la kadavro, li eliris el sia poŝto tranĉilon por distranci la ŝnuron. Sed palpinte la tute rigidigitan manon, li trankvile detris kelke da paŝoj kaj fotografis la scenon . . . Tio ankaŭ estos imponanta, sed jam por alia parolo: tion utiligos por si la laboristaj gazetoj. „Homo, kiu venis por la meeting'o ankoraŭ pli frue! Nova viktimo de la mizero en la plej riĉa lando de l' mondo.“

Ĉiokaze la noto faros grandan sensacion, kaj la redakcio estos kontenta.

14-an, kiu estis tre sukcesa. Prof. W. E. Collinson, M. A. Ph. D. de la Universitato de Liverpool, mem sperta esperantisto, prezidis kaj faris tujan paroladon pri la utileco de Esperanto ĉiurilate. Lia juĝista moŝto Thomas, kiu lernis Esperanton en ok horoj, bedaŭris sian foreston.

La Liverpool'a grupo kunvenas ĉiuvendrede, kaj oni aranĝis bonegan programon. Dum la unua horo oni legas „Tra la ĵaro“ sub la gvidado de s-o Rawlinson, kaj okaze de la Zamenhof'a Soleno la 16-an de decembro estos aranĝata algranda koncerto, tute en Esperanto. Interesuloj nepre demandu detalojn de la sekretario: R. Prys Griffiths, 57 Ramilies road, Liverpool.

Esperanto en Internacia Popola Universitato.

En la komenco de tiu ĉi ĵaro fondiĝis en Helsingör (Danlando) internacia popola universitato, kiu intencas, sekvante la tradicion de la famaj ordinaraĵ alternejoj popoloj, alproksimigi anojn de diversaj nacioj, loĝigante ilin kune por studo kaj laboro.

La lernejo estas endomigita en farmo en unu el la plej belaj partoj de la lando. La ĝardeno kaj kampoj (kune 11 ha.) estas kulturataj de la lernantoj mem. Ĉiuj lernantoj ĝis nun devas koni la anglan, germanan aŭ danan lingvon. Dum la somero oni enkondukis la instruon de Esperanto, kiun provon oni devis ĉesigi pro reiro de la instruisto al sia patrolando.

Feliĉe oni nun trovis instruistinojn, kiu depost la 1-a de novembro rekomencos la instruadon. Bedaŭrinde la esp. instruado estas provizore, kiel provo, deviga nur por germanoj. La aliaj ricevas ĝin fakultative.

Esp. junuloj, kiuj interesiĝas pri la universitato, ne forgesu postuli la definitivan enkondukon de Esperanto kiel kondiĉon de sia lernantigo. Adreso por aliĝo en angla, germana aŭ dana lingvoj: P. Mannicke, Sofienlyst, Helsingör. *H. J. B.*

Esperanto-Lernejo Auerbach

ĵus komencis sian instruadon en la ejoj de l' seminaro, disponigitaj de la Saksa Instru-Ministerio. El 80 seminaranoj 40 estis elektataj de la direktoro por esti instruataj pri Esperanto en du klasoj po 20 lernantoj. La instruon gvidas la seminaraj instruistoj s-oj studaj konsilistoj d-roj Trögel kaj Rülke. 40 aliaj seminaranoj dezirantaj lerni Esperanton devos atendi ĝis venonta ĵaro. Krome komenciĝis du kursoj por plenkreskuloj (entute 60 partoprenantoj), gvidataj en la seminaro de s-oj burĝerneaj instruistoj Müller kaj Posern, unu kurso por sinjorinoj kaj unu por junaj instruistoj, kiuj sin preparas por sia ekzameno post Kristnasko.

La Saksa Esp. Instituto aranĝis konstantan ekzamenon en Auerbach, ĉe kiu povas esti ekzamenataj ankaŭ eksterurbanoj. (Senpagaj leĝoj estas disponeblaj.) Adreso: Esp. Ekzamena Komitato, aŭ Esperanto-Lernejo. Auerbach i. V.

Komerc.

Komerc ĉambro de St. Omer

(Jam voĉdoninta favore al Esperanto) en sia kunveno de 1. okt. decidis aliĝi al la poresperanta decido de la Kongreso de l' Rajtoj de Popoloj kaj komuniki tion al la ministro de agrikulturo, komerc kaj publika instruado.

Komerc ĉambro de Cluj

en Transilvanio voĉdonis por Esperanto. (Legu en la hodiaŭa numero sub „Esperanto en Transilvanio“).

Efektive la noto pri la kadavro kaj la desegnaĵo aperis en la gazeto pli frue ol la polico scias pri la akcidento. Laŭ stranga preterlaso („... kiu cetero povas okazi ĉe la plej bona polico“, skribis poste kelkaj gazetoj) la popolo jam komencis kolektiĝi ĉirkaŭ la kadavro, antaŭ ol la polico sciiĝis pri la okazintaĵo.

Mateo Lozinski, kiu kompreneble nenion legis pri la meeting'o, nun vidis, ke en la parkon homoj kunvenadis el ĉiuj flankoj. El stratoj kaj stratoj amase aliradis viroj en jakoj verdire sufiĉe eluzitaj, en surtutoj, same tute malnovaj, en ĉapeloj ĉifitaj, en ameliaj kvankam ne tute puraj ĉemizoj. La ĝenerala aspekto de ĉi tiu amaso da homoj kun lacaj elturmentitaj vizaĝoj trankvilige impresis Mateon. Li sentis en ili parencajn, simpatiajn estaĵojn. La viroj kunvenis ĉe la fontano sed, eskiantante pri la memmortigo, sin direktis al tiu arbo kaj kiel formikoj ariĝis sub ĝi, malgajaj, severmlenaj, indignantaj.

Ankaŭ Mateo kuraĝis eliri sur la placon, kie staris grupo da nigraĵaj viroj, ankoraŭ pli elfonvestitaj ol aliaj, en akrapintaj larĝgrandaj ĉapoj. Iliaj okuloj estis kvazaŭ prunoj, la vizaĝoj brunaj, la voĉoj sonis kiel muziko, mole kaj melodie. Ili estis italoj.

Ili rememorigis al Mateo slovakojn, kiuj venadis en lian hejman regionon de la Karpataj montoj, tial li konfideme provis ilin alparoli. Sed ree neniu lin komprenis. La italoj indiferente turnadis al li la kapojn; unu palpis lian blankan kleton kaj mire klakis per la lango. Poste li kun plezuro pelpis la muskolojn de lia brako kaj ion diris al sia kamarado, kiuj per bruaĵ krioj esprimis sian laŭdon. Kaj nenon pli Mateo povis ricevi de ili! Li vidis, ke iliaj okuloj brilas kiel fajro, kaj ke kelkaj el ili ĉe la zonoj de l' jakoj havas negrandajn tranĉilojn.

Kurso en redakcio de grava komerca revuo.

La 19. okt. komencis esp. kurso en la redakcio de „Echos de l'Exportation“ en Paris, gvidata de s-o Dubois, industriisto, sekr. de la pariza grupo.

ET senpage.

Komerc ĉambroj favoraj al Esperanto povas ricevi ET senpage, se ili petas ĝin de la administrado en Köln-Horrem.

Tekniko.

Germana fizikisto Court Gross loĝanta en Norvegia lando ĵus konstruis akumulatoron, kiu certe havos epokfarantan signifon en la motor-industrio. Ĝi havas sesoble pli grandan kapablon ol ĝis nun konataj akumulatoroj. Pro tio, ke ĝi ne glaciĝas, ĝi precipe estas uzabla en regionoj kun malvarma klimato. La eltrovaĵo estas zorge provata de ekspertoj kun bonega rezulto. (Laŭ artikolo en taggazeto tradukis M. Muribó.)


TEKA.

La TEKA sciligas ĉiujn kuracistojn esperantistajn, ke dum kongreso de Praha estas fondita Centra Oficejo de TEKA, kiu donas ĉiujn informojn pri la kuraciata asocio. La sidejo de la Centra Oficejo estas Varsovio, Pol., str. Marszalkowska 113, d-ro W. Robin.

Vegetarismo.

Esp. kurso en bulgara ĉefurbo.

La 6. okt., Unuigo de Esp. Vegetaranoj en Bulgario malfermis kurson (gvid. Dim. Simeonov) en manĝejo de vegetara restoracio en Sofia. Pro multnombro de la kursanoj oni devas dupartigi la kurson. La estraro de la Veg. Kooperativo senpage disponigis la salonon kaj mendis por la kurso, je siaj elspezoj, nigran tabulon.



Presado de la unua numero de ET.

Pri la presado de la unua numero de ET ni farigis fotografadon, kiu bedaŭrinde malklarigis pro tio, ke la fotografisto fiksis du bildojn sur la saman platon. Tamen la bildo vidigas sufiĉe bone, kiamaniere la maŝino estas mane funkciigata (per turnilo). Dekstre staras la eldonanto de ET, maldekstre lia frato; sed la fizionomioj estas tiel malsimilaj, ke la eldonanto apenaŭ rekonas sin mem. Sur la maŝino vidiĝas ĵus presita ekzemplero de la unua (specimena) numero de ET, kiu cetero estas ankoraŭ ricevebla (8-paĝa) por du respond-kuponoj aŭ du germanaj markoj.

Baldaŭ la homamaso jam kovris la tutan placon. Super ĝi staris maldensa polva nebulo, kaj seninterrompa bruado de voĉoj flugis super la homaj kapoj.

Apud la arbo, kie pendis la malfeliĉulo, movado komenciĝis. Severaj kaj gravaj tien iris policanoj en siaj grizaj ĉapoj. Oni ilin mokis, oni ilin salutis per malicaj vokoĵ kaj spritaĵoj, montrante al ili gazetan ekzempleron sed ili nenon atentis. Nur apud la arbo okazis konfuziĝo: inter la grizaj ĉapoj kaj la nigraj, flavruĝaj kaj diverskoloraj ĉapoj levigis kaj mallevigis lignaj policaj bastonoj, fine la kadavro ekbalanciĝis, la kapo de la mortinto subite kliniĝis, kaj la kadavro malsupreniĝis ĝis la homamaso.

Mateo refoje demetis sian ĉapon kaj faris signon de kruco. Samomente de la placo aŭdiĝis sonoj de muziko. Turninte la kapon tien, la Loziŝcano vidis, ke ĉi post la alta konstruata domo, el strato ruliĝis nubo da ora polvo, kvazaŭ brutaro aŭ granda taĉmento estus pelata al la parko. La nubo eligis sonojn de klarnetoj kaj kupraj trumpetoj, de tamburoj kaj aliaj instrumentoj; la muziko ĵen mallaŭtiĝis, — kaj tiam aŭdiĝis nur sonora pledfrapado de miloj da homoj, — jen subite ree fortiĝis. Antaŭe kuris du vicoj da strataĵ buboj, kaj marŝis alikreska tamburisto, takte svingante sian grandan bastonon. Lin sekvis muzikistoj kun plumblovitaj ruĝaj vangoj, en kaskoj, ornamitaj per plumoj, kun grandegaj epoletoj sur la ŝultroj, en multkoloraj uniformoj, broditaj tiamaniere, ke ŝajne ne restis eĉ unu peco da ŝtofo, kiun ne kovris galono aŭ pasamento.

(Daŭrigota.)

Post sia finiĝo en ET „La Senlingvulo“ estos eldonata en libra formo, sed nur en 400 ekzempleroj. Tial antaŭmendo estas konsilinda.

Internacia Labora Oficejo

La Internacia Labora Oficejo kunvokis trian internacian konferencon, kiu malfermiĝos en Genevo la 25. okt. kun reprezentantoj el 52 ŝtatoj, t. e. ĉiuj anoj de la Ligo de Nacioj kaj aliaj ŝtatoj kiel Germanio, kiuj ankaŭ partoprenas la internacian organizaĵon pri Laboro, starigitan per la packontrakto en Versailles. Oni diskutos ĉefe kiel apliki al terkulturo la regulojn pri laborkondiĉoj akceptitajn en Washington 1919 t. e. daŭro de laborotago, protekto kontraŭ akcidentoj aŭ malsanoj, penso pro maljuneco. Ankaŭ sur la tagordo staras problemo pri ĉiusemajna ripozo en komerco kaj industrio kaj malpermeso uzi ceruzon por pentrado.

Ĉiu ŝtato estas reprezentata per apartaj delegitoj de la laboristoj, de la mastroj kaj de la registaroj. Post la Washingtona Konferenco, kiu speciale zorgis por leĝigi 8-horan laborotagon, 30 leĝoj estis jam voĉdonitaj de ŝtatoj-anoj, kaj 63 leĝprojektoj staras antaŭ Parlamentoj. La dua konferenco en la itala haveno Genova 1920 ĉefe zorgis pri dungo kaj protekto de maristoj.

La Internacia Labora Oficejo, starigita en Genevo per la Packontrakto, jam multe kaj sukcese klopodis por aplikigi la rezoluciojn de la konferencoj. Ĝi ankaŭ regule eldonas plej utilajn statistikojn kaj rezultojn de siaj enketoj en ĉiuj landoj. Por diskonigi sian celon kaj leĝan fundamenton en malproksimaj landoj de la mondo ĝi publikigis tri interesajn dokumentojn en internacia helplingvo Esperanto: 1. Kio estas Internacia Labora Oficejo? Kial ĝi estas kreita? — 2. La Internacia Labora Organizo. — 3. La Labora Carto.

Estas fakto, ke la Ligo de Nacioj ĵus decidis enmeti la demandon pri instruado de Esperanto en ĉiulandaj lernejoj sur la tagordon de sia venonta kunido kaj komisiis sian ĝeneralan sekretariaron prepari plenan raporton pri la spertoj jam faritaj per Esperanto.

Mallongaj Esp. Sciigoj.

Esperanto en Marseille.

Pro manko de loko ni citas nur la plej gravajn faktojn el la interesa jarraporto de s-o Moreno, del. de UEA en Marseille:

En Marseille (Franc.) ekzistas nun krom la Esp. Oficejo kvar grupoj: Zamenhof-Grupo, Esp. Grupo, Intersindikata Grupo kaj SAT-Grupo. En ĉiuj grupoj bone vizititaj kursoj. Oficialaj kursoj de la Laborborsa Esiraro ĉe Intersind. Grupo. Okaza de disdono de premioj en Laborborso la 25. sept. inter ĝenerala laŭreataro troviĝas kvar premioj por Esperanto: supera kurso, hon. premio R. Abrie, 1-a pr. Ramon Torres; elementa kurso, hon. pr. f-ino E. Lorenzo, 1-a pr. T. Lantheaume. La loka gazetararo publikigis artikolojn pri la disdonado de l' premioj kaj laŭde citis la nomojn de ni kaj s-ino Christine (blindulo) kaj Lantheaume (60-jarulo).

La Zamenhof-Grupo festis la 2. okt. sian kregon per bulludkonkurso kaj festeno, dum kiu f-ino Casale kolektis 15 fk. por la rusaj malsanaj infanoj kaj infanoj kaj proponis gastigadon de rusaj infanoj; s-o Moreno kolektis 20 fk. por „Esperanta Ligilo“.

Fine ni citu ankoraŭ la trapason de japanaj kaj ĉinaj samideanoj, frate gastigitaj en Marseille.

Progreso de Esperanto en Antwerpen.

Sekve de sukcesplene farita enketo internacia de la Centra Lerneja Komitato de la urbo Antwerpen pri la aplikilo en aliaj landoj de la leĝo pri deviga instruado (La C. L. K. ricevis 66 respondojn el 45 diversaj landoj kaj ŝtatoj) tiu komitato rekomendis varme Esperanton ĉe sia urba administracio kaj esprimis la deziron enkonduki la lernadon de nia lingvo en la oficialajn vesper-

kursojn kaj en la superajn klasojn de la unuagrada instruado kaj en la lernejoj por instruistoj. Ni povas jam nun noti unuan rezultaton de la vigla klopodado de la Lerneja Komitato de Antwerpen: La urba administracio enskribis Esperanton inter la fakoj lerneblaj en la oficialaj vesperkursoj. La sekretario de la Centra Lerneja Komitato de Antwerpen estas nia s-ano Frans Schoofs.

Novaj kursoj en Sclessin.

La esp. grupo en Sclessin (Belg.) malfermis du kursojn.

Paroladoj.

La 14. okt. s-o Archdeacon parolis pri Esperanto en la urbdomo de St. Quen apud Paris, la 15. ĉe malfermo de esp. kurso organizita de Politeknika Asocio en Paris, rue Lepic 62.

Paroladoj en Genova (Italio)

La 6. okt. en la sidejo de la „Laborista Esp. Grupo“ pri la XIII-a en Praha (s-o Barni) kaj pri la VI-a liala Kongreso en Trento (s-o Managlia) havis bonan sukceson, same raportio de s-o Arabeno pri la tipoj de l' kongresanoj. La ĉiutaga loka ĵurnalaro favore akceptas kaj publikigas komunikojn pri Esperanto. La katolika ĵurnalo „Il Cittadino“ enhavis la 18. sept. tutkolan artikolon pri Esperanto.

El Rejnlando (Germ.).

En Krefeld s-ano Giessmann faris bonegan paroladon pri Esperanto, pri kiu ankaŭ raportis la lokaj ĵurnaloj.

S-o Joh. Bettges komencis la 11. okt. kurson en Sürth apud Köln.

En Köln la esp. movado bone progresas inter la laboristaro. Socialista deputito s-o Fries tre interesiĝas pri Esperanto.

El Nederlando.

En Bergen op Zoom s-o J. Holleman komencis kurson kun 20 partoprenantoj.

La 30. sept. parolis en Hago pri Esperanto s-ino Isbrücker antaŭ pli ol 200 personoj. Bela serio de lumbildoj pri la kongreso de Dresden kaj Praha, faritaj de s-o J. Ravesteln, vekis multe da intereso. Sekvis kurso kun 35 gelernantoj.

Dek tagojn poste parolis en la sama salono s-o B. Yzerdraat, la „famoza“ delegito de la nederlanda ministro de instruado al la Wien'a kongreso. Ĉeestis ĉ. dudek esperantistoj, ok idistoj kaj eble ses neŭtraluloj. La parolanto, konstatinte la konsiston de sia aŭdantaro kaj timante diskutojn, lerte evitis ĉiujn atakojn kontraŭ Esperanto, kvankam la montriitaj lumbildoj (komparoj de voriserioj en Esperanto kaj ido) klare pruvis, ke li intencis akre kritiki la „lingvaĉon“ Esperanto.

Nur en la fino lia malhonesta klopodo verbi anojn por ŝajne neŭtrala mondlingva unuigo, kiu klopodos instigi la Ligon de Nacioj al elekto, preskaŭ vekis skandalon. La rezultato de la parolado estis kompreneble nenio.

El Varsovio.

Gastas nun en Varsovio la sekretarino de la Esp. Centra Oficejo en Paris, s-ino Cense.

La 27. sept. okazis monata kunveno de la Rondo „Konkordo“, dum kiu paroladis s-ino Cense, d-ro W. Robin kaj f-ino d-ro Muszkatblat. Ĉeestis la kunvenon prof. B. de Courtenay, s-ino Klara Zamenhof kaj aliaj eminentaj gastoj.

La delegitaro de UEA en Varsovio scilgas, ke de nun okazos ĉiunmerkreda renkontoj de UEA-anoj en la granda kafejo de A. Blikle, str. Nowy-Swiat 35, je 7 h.

ET en Vladivostok.

ET nun estas ankaŭ poekzemplere vendata en malproksima Oriento. La firmo D. Zigurl kaj J. Zuj en Vladivostok (Siberio) mendis ĉiusemajne 25 ekzemplerojn de ET por la opa vendado. Ni esperas, ke ni povos ankaŭ en Tokio arangi la opan vendadon.

Internacia Esp. Servo.

LETERO EL PALESTINA.

Haifa, 26. sept. 1921.

Multfoje mi devis paroli pri maltrankvileco kaj necerteco en la Sankta Lando. La maltrankvilo inter araboj kaj judoj daŭras kaj daŭros almenaŭ en la koraj sentoj; sed la malcerteco de la lando koncerne banditojn kaj rabistojn feliĉe ĉesis grandparte sekve de kelkaj plenaj sukcesoj de la policoficistoj kontraŭ la tri precipaj rabistobandoj de Palestina lando. Ĉiuj pli-malpli formiĝis en Transjordanio kaj maltrankviligis unu la distriktojn de Galilea, dua la distriktojn de Samaria, tria la distriktojn de Jeruzalemo kaj Jaffa. Krom la mono de la vojaĝantoj aŭ de la vilaĝanoj ili rabis precipe ĉevalojn, bovojn, ŝafojn ktp. La proksimeco de Transjordanio kaj de la franco-sirila regiono faciligis treege la rabadon. Sed nuntempe interkonsento fariĝis inter Sirio kaj Palestina pri reciproka ellivero de banditoj. Ĉiuj estroj de la bandoj estas aŭ kaptitaj aŭ mortigitaj kaj same la plimulto de la bandanoj. La policoficistoj pli sentimaj kaj ruzaj estas rekompencitaj kaj grade aliigitaj.

Ankaŭ fariĝis interkonsento inter Palestina lando kaj Sirio pri limdepago por komercaĵoj senditaj inter Haifa kaj Damasko. Laŭ „Palestine Weekly“ de Jeruzalemo la nova parto de Haifa estas konstruata senprokraste dum la venontaj kvar jaroj de S. Pearson & Co. Je la sumo de dek milionoj pundoj sterlingaj. Privilegioj kaj koncesioj en la estonta parto estas donataj al la kompanio.

Inter la pilgrimantoj al la sanktaj lokoj dum la lastaj tagoj evidentiĝis la dukto de Sunderland, filo de la reĝo de Svedlando. El Usono alvenis unu ĉefepiskopo kun kanoniko, pastroj kaj kelkaj

ialoj. Ili vizitis ankaŭ Halfa'n, la Karmelon, Nazaret'on kaj la Lagon de Tiberias.

Granda malhelpo de esperanta propagando saĝnas al mi la manko de malmultkostaj lernolibroj. Oni deziras lerni sed sen elspezoj. Antaŭ la mondmilito ni havis la idealan lernolibron „Slosilo de Ĉefet“ en ĉiuj lingvoj eŭropaj, escepte la grekan kaj rusan, je la nekredbla prezo de 5 pfenigoj aŭ centimoj. Ĝi enhavis gramatikon, vortaron kaj malgrandan tekston. Sufiĉis por lerni, traduki kaj entuziasmiĝi. Poste plezure oni aĉetis vortaron. Kiu nuntempe publikigis slosilojn similaĵn malmultkostajn en la precipaj eŭropaj lingvoj? Estus laŭ mia opinio la plej efika propagandilo.

P. E. S.

Aŭtuno.

Kovras roslarme velkintaj petaloj
Etan kadavron de papilio . . .
Kante siblante tra l' montoj kaj valoj
Vento murmuras kun melodio
Kaj plendas plor'
De flordolor'
Pri froste brilanta la suno
Kaj tremas ter'
En malesper',
Ĉar, jen, alvenis Aŭtuno.

Kial tremadas en viaj okuloj
Larmoj pentantaj pri ama ĝuo?
Morgaŭ ja kovros memoraĵ nebuloj
Amon someran per la enuo
La sanga ĝem'
De koramem'
Tre vane . . . Jam frosta la suno
Por nia kor'
Velkiĝis flor',
Ĉar, jen, alvenis Aŭtuno. *Julio Baghy.*

Blinduloj.

Nova sukceso en Germanio.

La delegitoj de la Germana Blindulinstruista Asocio (Deutscher Blindenlehrer-Verein), kunvenintaj la 8.—9. okt. en Halle a. S., decidis proponi al la ministerio, ke en la nova ordo de la blindulinstruista ekzameno Esperanto estu aprokata kiel samvalora fremdlingvo apud la franca kaj angla. La propono estis farata de la direktoro de la blindulinstituto en Nürnberg s-o Reiner.

Inter blinduloj Esperanto jam delonge estas disvastiganta (legu pri tio ilustr. artikolojn en la sekvontaj numeroj de ET!). La germana blindulinstruistaro estas la unua, kiu oficiale atestas la valoron de nia lingvo ĉe la laboro por kaj inter la blinduloj. Estu tio instigo por niaj samideanoj en la tuta mondo, atentigi la blindulinstruistojn de ĉiuj landoj pri Esperanto.

M. Urban, Frankfurt a. M.

Donacoj por „Esperanta Ligilo“

alvenis ĝis nun pli ol 2000 mk. Novan liston de donacintoj ni publikigos en proksima numero.

Lernejo.

Esperanto-Asocio de Saksaj Instruistoj.

Okaze de la ĉefkunveno de l' Saksaj Instruist-Uniigo en Dresden, la estraro de la Esp. Asocio de Saksaj Instruistoj estis invitita al fakokunsido. S-o Scheibler, Niederhermsdorf apud Pötschappel, montris kun gelernantoj de sia vilaĝlernejo esp. lecionon laŭ la moderna metodo de la laborinstruo. Nia lingvo estas deviga fakoj en tiu ĉi lernejo. La sukceso estis tre laŭdinda.

La ĉefpunkto de la tagordo estis la parolado de d-ro Steche, prez. de GEA. Li montris la nuntempan staton de nia movado kaj postulis: Esperanto por la lernejoj kaj por la sciencoj! Estis granda ĝojo, aŭskulti la konatan paroladinton. — S-o Sykora, prez. de la Esp. Asocio de Saksaj Instruistoj, dankis pro la bonega parolado. — Plue s-o Söhrmann, prez. de la Asocio de Germ. Instruistoj, raportis pri la laboroj en la faka kunveno en Praha. — Prof. d-ro Dletterle de la Saksaj Instruistoj en Leipzig respondis kelkajn demandojn pri ido, pri la ekzamenoj ktp. La deziron el la mezo de la partoprenantoj pri pli detalaj gazetaraportoj oni plenumis nun. La ambaŭ prezidantoj ilal petas pri multe da sciigoj el la saksaj kaj germana instruistaro, rilatantaj al nia movado inter la gelinstruistoj. Oni atentu la raportojn en la venontaj numeroj de ET.

*) Tamen, konsiderante la ĉaman mankon de loko en ET, ni petas nur plejeble koncizajn, severe laŭfaktajn raportojn sen iaj necesaj vortoj kaj frazoj; la hodiaŭa jam estas tro detala. — Red.

Fervolo.

Esperanto ĉe fervojoj en Ĉeĥoslovakio.

Ĉsl. fervoja ministerio eldonis ordonon (30. 8. 21., n-o 45959 — pres 2), laŭ kiu ĉiu fervoja oficisto konata Esperanton devas esti en servado preferinda, ĉe samaj aliaj kondiĉoj. Kaj ankaŭ fervoja direkto de Olomouc eldonis ilurilitan ordonon (n-o 0976, 15. 9. 1921). La direktoro s-o Kolaček tre favoras nian movadon.

Fremdula Leglo.

En la fremdula legio en Maroka lando fondiĝis esp. grupo de diversnaciaj soldatoj dank' al la klopodoj de nia rusa samideano kaporalo Vasilieff. Diverslandaj samideanoj bonvolu sendi diverslingvajn lerno- kaj legolibrojn laŭ la adreso de la sekretario s-o Vegoff, n-o 11671, 4-e Régiment Etranger, 1-e Bataillon, 3-e Compagnie, Beni-Mellal (Maroka lando).

Antaŭkongreso 1922.

Dezirante arangi antaŭkongresan kunvenon en Tallinn (Reval), se sin anoncos por ĝi ankaŭ eksterlandaj esperantistoj, Estonia Esp. Unuigo „Espero“ petas ĉiujn gesamideanojn intencantajn viziti Tallinn, la ĉefurbon de Estonio, dum ilia vojaĝo al la XIV-a, informi pri tio la estraron de „Espero“ laŭeble ĝis 1. Jan. 1922. — Adreso: Est. Esp. Unuigo „Espero“, Tallinn, Estonio, postkasto 6.

Aliaj esp. gazetoj bonvolu reperi.

Italoj atentu!

En la propagandfolio por Novstarigo de Internacia Sciencia Asocio kaj Sciencia Revuo bedaŭrinde enŝoviĝis grava malkorekto rilate al la adreso de s-o prof. Alessio. La malĝusta adreso estas miksaĵo el jenaj du, kiuj ambaŭ estas korektaj:

Reĝa Universitato, Torino,
Via S. Pietro 92, Padova.

Do bonvolu atent!, kiam vi sendos viajn aliĝilojn kaj pardoni al la sekretario

D-ro Walter Döhler,
Riesa (Elbe) Germanlando.

Koncizeco

kaj rapideco ĉe raportoj estas nepre necesa. Nur faktoj, nomoj, datoj, nombroj! Nenia superfluaĵo. Sole ĉe gravaj okazintaĵoj detalaj raportoj estas dezirindaj. Estonte ni senskrupule mallongegiĝos ĉiujn vastiĝemajn raportojn. Raportojn alsendu tujege! Raporto senditaj nur 2—3 semajnoj post okazintaĵo estas senefikaj kaj ne presindaj.

Internacio Katolika.

MOKA (Mondjunularo Katolika).

En septembro okazis en Roma Internacia Katolika Junula Kongreso, en kiu partoprenis pli ol 100 reprezentantoj el 26 landoj. La ĉefsekretario de Moka, s-o Hanns Suppl, klopodis, ke oni akceptu Esperanton kiel ligan lingvon. Kvankam la ĉeestantaj francaj kaj belgaj delegitoj tute rifuzis tiun proponon, oni tamen konsentis, ke Moka en la ĝisnuna maniero prenu sur sin la disvastigon de Esperanto inter la katolika junularo tutmonda.

Gazetaro.

FRANCA GAZETARO.

Le Droit du Peuple, Grenoble, 4. kaj 6. 10. (Notol.)
Le Droit des Femmes (La Rajto de la Virino), sept.
Le Sud-Est, Lyon, 8. 9., kaj Le Progrès de Lyon, 8. 9. (Raportol.)
L'Alsace, Belfort, 4. 10. (Esp. ĉe Ligo de Nacioj.)

GERMANAJ GAZETOJ.

Allgemeine Zeitung, München, 2. 10. (Komerclato kaj Esperanto)
Recklinghäuser Zeitung, 25. 9. (Notol.)
Bote vom Niederrhein, 19. 9. (Notol.)
Mainzer Journal, 27. 9., 5. 10. (Notol.)
Mainzer Anzeiger, 28. 9. (Notol.)
Breslauer Neueste Nachrichten, 19. 9. (Notol.)
Volkswacht, Breslau, 1. 10. (La signifo de la esp. lingvo.)
Westfälische Neueste Nachrichten, Bielefeld, 30. 9. (Letero el Palestina laŭ ET.)
Krefelder Zeitung, 7. 10., kaj Generalanzeiger, 7. 10. Krefeld. (Raporto de preisp. parolado.)
Neuköllnische Zeitung, 14. 10., Neukölln. (La utilo de la internacia helplingvo.)

ALILANDA GAZETARO.

Vorwärts, Reichenberg, Ĉsl., 4. 10. (Mondlingvo kaj Scienco.)
Völkerrund, Karlsbad, Ĉsl., 8. 10. (Noto kaj artikolo.)
Nowy Dziennik Białostocki, Białystok, Pol., 8. 10. (Esperanto ĉe Ligo de Nacioj.)
Posener Neueste Nachrichten, Posen, Pol., 7. 10. (Esp. anguloj.)
Volkszeitung, Bromberg, Pol., 24. 9., 1. 10., 8. 10. (Esp. anguloj.)

Recenzejo.

(Linuope senditajn librojn ni mencias, duoble senditajn ni recenzas. Monataj esp. gazetoj sendu du ekzemplerojn interŝange kontraŭ unu ekz. de nia semajna ĵurnalo.)

LIBROJ.

FABLOJ DE LESSING. El germana lingvo tradukis L. E. Meier. Libro unua — 30 fabloj, — Popola Bibli. Esp. n-o 8. — 16 pg., 11¹/₂; 14¹/₂ cm. Eldonejo E. Rothenel, Gr.-Tabarz, Thür. Germ. Prezo broŝ. 1,60 mk. (por Germ.) kaj 2,50 mk. (por eksterlando).

La eldono de la Popola Bibli. Esp. estas konataj kaj ŝatataj pro la bona enhavo kaj la malalta prezo de la libroj. — Trideko da fabloj de la eminenta germana klasikulo G. Ephraim Lessing plenigas la okan kajeron de tiu biblioteko. Nia samideano Meier lerte tradukis la fablojn. Lia morto estas granda perdo por ni, ĉar li estis bonega propagandisto kaj ankaŭ homo, kies diligenco rilate al tradukado estis modela. Liaj verkoj estu nia hereditaĵo. (G. Aŭl.)

PROSPEKTOJ, FLUGFOLIOJ.

MANIFESTO de la Defenda Ligo por la teritorio unuigo de Hungarlando al la esperantistoj de la mondo. Nova eldono (3000 ekz.). Havebla ĉe Defenda Ligo, Budaĉpe IV, Vaci-utca 81-83.

GAZETOJ.

BULGARA ESPERANTISTO. Sept.
AMERIKA ESPERANTISTO. Sept.
INFORM-BULTENO de Esp. Sekcio en urbo Malaja-Viŝera, Rusio, N-o 1.

LA ESPERANTISTO. Aŭg.-sept. Adreso: Wien II, Postamt 54.

SENNACIECA REVUO. Okt. La antaŭa Esperantista Laboristo. Adreso: 177, rue de Bagnolet, Paris. Nova redaktoro s-o E. Lamy, 24 Bd. Beaumarchais.

Jen prezentigas al ni bonpapera, bele prebita, 16-paĝa revuo ilustrata. La unua numero estas riĉenhava: Mondlingvo kaj Klasbatalo, 1-a Kongreso de la Revolucia Esperantistaro, Vojaĝimpresoj kaj Rimarkoj, Inter ni, Notol., La Angulo de la Poetoj, Morto de Mercier, Diversaĵoj, Kroniko, Esperanto en la Praktiko, Libroj, Gazetoj, Nekrologoj ktp.

Anoncetoj.

Germanaj samideanoj dezirantaj korespondi aŭ interŝanĝi.

Friedrich Jacobi, Koblenz, Germ., Bahnhofstr. 29, deziras korespondi per leteroj kaj kartoj kun samideanoj el ĉiuj mondpartoj.

Philipp Hahn, Hamburg 25, Conventstr. 38, Germ., deziras korespondi kun junaj gesperantistoj ĉiulandaj, escepte tie ĉeĥoj.

S-o W. Schmutzer, Rüstingen, Germ., Friß Reuterstr. 16, deziras korespondi per poŝtkartoj ilustritaj kaj leteroj kun ĉiuj landoj.

Peter Klopfielach, Düsseldorf, Germ., Ronsdorferstr. 81, korespondas per poŝtkartoj ilustr. (bfl.) kaj leteroj kun ĉiuj landoj. Interŝanĝas ankaŭ poŝtmarkojn.

S-o Teo Vreden, Neuhofstr. 12 b, M'helm-Rheinau, Germ., deziras korespondi per leteroj kun fraŭlinoj el ĉiuj landoj.

S-o Willy Preis, Düsseldorf, Germ., Friedenstr. 79, deziras korespondi kun ĉiulandaj s-anoj per poŝtkartoj ilustritaj.

S-o Kurt Strobel, Plauen i. V., Germ., Knieholzstrasse 44, deziras interŝanĝi poŝtkartojn (bfl.) kaj poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj.

Por 100-200 poŝtmarkoj de ĉiuj landoj ni resendus la saman nombron de Germanlando. S-o Jos. Krißemann, Recklinghausen, Steinstr. 12, Germanio.

S-o Karl Koch, Plauen i. V., Germ., Viktorlastrasse 97, deziras interŝanĝi poŝtkartojn (bfl.) kun ĉiuj landoj.

S-ano Rud. Nawrot, Düsseldorf, Germ., Charlottenstr. 8, deziras korespondi per poŝtkartoj ilustritaj.

S-o Kurt Höfer, Plauen i. V., Germ., Topfmarkt 11, deziras interŝanĝi poŝtkartojn (bfl.), poŝtmarkojn kaj gazetojn kun ĉiuj landoj.

S-o Theo Meisen, Düsseldorf, Germ., Ellerstr. 156, deziras interŝanĝi ilustr. poŝtkartojn kun la tuta mondo.

La Esperanto-klaso de s-o Neuperi, Leipzig-Mb., Germ., Wedlstr. 17, deziras korespondi kun eksterlandaj esperantistoj.

Heinrich Rhein, Mainz a. Rh., Germ., Hopfengarten 4, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj.

S-o Hans Schwiddergoll, Wilhelmstr. 8, Oels, Silezio, Germ., deziras korespondi per leteroj aŭ poŝtkartoj ilustr. kun gesamideanoj el ĉiuj landoj.

S-o Rudolf Hobijn, Parkstr. 2, Oels, Silezio, Germ., deziras interŝanĝi poŝtkartojn ilustr., poŝtmarkojn, esp. sigelmarkojn kaj esp. gazetojn. Mi korespondas angle aŭ esperante.

Anoncetoj.

GEEDZIĜO. Sian geedziĝon anoncas D-ró Otto Müller en Echterdingen, Germ., kaj Klotilde Müller laŭnasklige Sellhorst el Lippstadt, Germ.

ANONCOIN por estonaj gazetoj kaj ĵurnaloj, disvastigado de personoj kaj ofertoj en Rusio prizorgas Esperanto-oficejo Vazalenu, Estonio. Almetu respond-kuponon.

TEKSAĴOJ. Samideanoj aĉetas teksaĵojn de Otto Meister en Ronsdorf, Germ. Petu proponojn.

GEJUNULOJ! Manuskripto rondiranta estas fondata. Gejunuloj verkemaj sin turnu, aldonante se eble poŝtm. por respondo, al H. Seppik, Tallinn, Manesi 7-12, Estonio.

12 FOTOGRAFAĴOJ de la XIII-a por 36 ĉ. kronoj riceveblaj ĉe Jiri Frankenberger, del.UEA, Bytčica u Ziliny, Slovakio.

„BES-a ADRESARO de Esperantistoj el ĉiuj Landoj“, 3-a eldono, kun 1000 adresoj kaj ilustraĵoj, estas ricevebla ĉe la eldonanto „Bohema Esperanto-Servo“, Moravany, Bohemujo, Ĉeĥoslov., por 10.50 germ. mk. aŭ 7 resp.-kup.

RUSIO. Esp. Sekcio de fako de popola klerigado en urbo M. Višera petas ĉiujn esp. redakciojn alsendadi al ĝi eldonatajn de ili ĵurnalojn kaj gazetojn; la sekcio rekomencos per alsendo de siaj eldonaĵoj. Adreso: Esperanta Sekcio, Malaja Višera, gub. Novgorod, Rusio.

ĈIUN NOVAN ESP. LIBRON kaj aliajn esperantaĵojn sendu kun notita prezo al esp. vendejo „Bohema Esperanto-Servo“, Moravany, Bohemujo, Ĉeĥoslov.

PLUMDESEĜNAĴOJ. motivoj de Praha ktp., proksimuma formato 17 : 25 cm, prezo 40-60 kĉ. Portretoj por karbo desegnitaj de 100-200 kĉ. (20 : 30 cm). Proponoj por esp. glumarkoj. — Georgo Bohutinsky, pentristo, Praha II, Palackeho nabrezi 1672-56 n.

ESPERANTISTOJ. La „Itala Esperantisto“, pro decido de la nacia lasta kongreso en Trento, ne plu aperis post la aŭgusta monato, kaj ĉiu, kiu volas la lastajn seriojn, rapidu sendi kompletan serion de sia gazeto, ĵurnalo, aŭ 8 (ok) italaj n. litojn laŭ hodiaŭa monŝanĝo. — Libro estas ĉiam pretaj, se vi volas interŝanĝi. Oni interŝanĝas poŝtmarkojn kaj korespondadas. — Adreso: Giolla, Ponte Seveso 50, Milano, Italio.

FILATELISTOJ. Jus aperintaj konstituciaj polaj poŝtmarkoj, belega eldono, same 30 diversaj antikvaj maloftaj poŝtmarkaj kompletoj de diversspecaj polaj pm.; same ukrainaj, Peilura, rusaj jubileaj Romanoff, generalo Judenitĉ kontraŭbatalanto de bolŝevikoj, rusaj sovjetaj kaj diversaj poŝtmarkoj de Litva Srodkowa de generalo Zeligovskĭ. Liverado al seriozaj kolektantoj. La pago per respond-kuponoj, bankbiletoj aŭ per neuzitaj naciaj poŝtmarkoj. Adolfo Oberroitman, Varsovio, Krak-Przedm. 10.

Korespondo kaj Interŝanĝo.

Helmi Drezen, Tallinn, Estonio, poŝtkesto n-o 6, pro trookupateco estas ofte devigata atendi ĉiujn skribintojn al ŝi. Si petas pardoni ŝin kaj sciigas, ke ŝi tamen nepre respondos al ĉiuj.

S-o Johannes Tamverk, Karja 5, Haapsalu, Estonio, deziras korespondi per poŝtkartoj ilustritaj (bildfil.) nur kun fraŭlinoj.

Lina Lillenblum, Tallinn, Estonio, Vladimír 7-5, deziras korespondi kun ĉiuj landoj per poŝtkartoj ilustritaj.

Matti Avinen, Kurekka, Finn., deziras korespondi per leteroj kaj kartoj kun samideanoj el ĉiuj mondpartoj, esceptite Germanlando.

F-ino Aura Leino, instruistino, deziras interŝanĝi vidaĵ-kartojn (bild.) kun ĉiuj landoj. Adreso: Wilpuri, Finnlando, Aionkatu 26.

S-ino Eeva Leino deziras interŝanĝon de ilustr. poŝtkartoj kun ĉiuj landoj. Adreso: Wilpuri, Finnlando, Aionkatu 26.

S-o Kust. A. Leino, kontoristo, interŝanĝas „slosilojn“, poŝtmarkojn, monerojn kaj monbiletojn, ankaŭ poŝtkartojn. Adreso: Wilpuri, Finnlando, Aionkatu 26.

S-o E. Siltanen, librotentisto, fraŭlo, deziras interŝanĝon de ilustr. poŝtkartoj kun ĉiuj landoj samideanoj. Adreso: Wilpuri, Finnlando, Püspankatu 6-as.1.

Petro Samokin, Rusio, Romny, Telegrafo, deziras korespondadi kun gesamideanoj per poŝtkartoj kaj leteroj.

D-ro Lajos de Györy Nagy, advokato, del. de UEA, sciigas siajn gekorespondantojn pri sia transloĝiĝo al Mezĉesat, Hungario, kaj petas ilin bonvole daŭrigi la ŝanĝadon de leteroj kaj ilustr. poŝtkartoj.

S-o Julio Környei, Budapest VII, Dob u. 108-1-6, deziras korespondi kun ĵurnalistoj kaj oficistoj pri kontumaj kooperativaj temoj kun ĉiuj landoj.

F-ino Olga Nemessanyi, 15-jara studentino, Imre utca 4, Miskolc, Hungario, deziras interŝanĝi ilustritajn poŝtkartojn.

S-ino D-rino Johano Gozon Fodor, kuracistino, Miskolc, Hungario, deziras korespondi per ilustritaj poŝtkartoj kaj amikaj leteroj precipe kun ekstereŭropanoj.

S-o D-ro Gozon Geza, kuracisto, Miskolc, Hungario, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn nur kun seriozuloj, precipe kun Rusio, Litovio kaj ĉiuj balkanaj ŝtatoj; volonte interŝanĝas ankaŭ kun aliaj eŭropaj ŝtatoj, interŝanĝo nur laŭ mankolisto.

Emeriko Lengyel, Budapest VIII, Kalvaria-ter 18, Hungario, deziras korespondi per poŝtkartoj ilustritaj, leteroj kaj poŝtmarkoj kun ĉiuj landoj.

S-o B. Szepessy, Hungario, Miskolc, Arany J. u. 29, interŝanĝas poŝtmarkojn kun la tuta mondo. — Por 100-200 poŝtmarkoj mi donas saman kvanton da hungaraj poŝtmarkoj aŭ povas rekomenci laŭ la valorigo de 1 katalogo Senf 1921, Michel 1920 (por eŭropaj poŝtmarkoj) kaj J. et T. 1920. Difektaj poŝtmarkoj estas maldezirataj. Unuafoje sendi mi ne povas, sed nepre rekomencos ĉiujn sendontojn.

S-o Bela Juki, X. Hölgy-u. 48, Budapest, Hung., deziras korespondadi per ilustr. poŝtkartoj kun ĉiuj landoj fraŭlinoj kaj kun Japanio.

F-ino Collignon, 10, rue Fauret, Paris 18, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn.

S-ino Chaulier, 110, rue de Sèvres, Paris 18, interŝanĝas poŝtmarkojn.

S-o Cugliolo Jean, 5 Avenue de la Liberté, Courbevoile (Seine), Franc., interŝanĝas poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj.

S-o ing. Leopold Berger, Moravany, Bohemujo, Ĉeĥoslov., interŝanĝas poŝtmarkojn, poŝtkartojn, esperantaĵojn; kolektas adresojn por sia „BES-a Adresaro“.

S-o Josif Polcsan, poŝt-telegraf-oficisto, Cluj, Transilvanio, Rumanio, deziras korespondi kun la tuta mondo per poŝtkartoj ilustr. kaj leteroj, kun fraŭlinoj pri ĉarmaj aferoj. Mi ŝanĝos fotografiaĵojn.

Ĉokolad laboristo deziras korespondi kun kolegoj el ĉiuj landoj. Paŭlo Nath, Libera Urbo Danzig, Germ., Schmedegasse 26.

John Tew. Eyck-Hinkel deziras korespondadi per ilustritaj poŝtkartoj. 2520 Channing Way, Berkeley, Kalifornio.

Vicente Orlando, Santa Fé 77, Bahia Blanca, Argentino, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun la tuta mondo, kaj korespondi pri ĉiuj temoj kun fraŭlinoj.

Theodor Schneiderheinze, Leipzig, Germ., Kanzlerstr. 27, deziras korespondi per poŝtkartoj ilustr. (bild.) kun la tuta mondo kaj interŝanĝi poŝtmarkojn.

Eksportado **Importado**

JAPANA

ESPERANTA KOMERCA KORPORACIO

JOKOHAMA, JAMAŜITAĈO 80

日本エスペラント貿易商會

輸出輸入商

横濱市山下町七十番

Korespondado ekskluzive en Esperanto

Telegrafa Adreso: Esperanto Jokohama.

Telegrafaj Kodoj: ABC Eldono 5-a, Bentley, Lieber, Western Union kaj Privata.

Reprezentanto: R. Kreuz, Frankfurt a. M. (Germ.), Hedderichstr. 75.

Artaĵo-, Bildo-, Libro-Vendistoj kaj Art-Amikoj,

kluj havas intereson por belegaj akvareloj, oleopentraĵoj ktp. de eminentaj kaj konataj pentristoj aŭstraj, turnu sin al

SEPP OSTERER, GRAZ, AUSTRIO,
Gleitsdorfergasse 5.

Favora okazo por aksterlandanoj pro la malalta valoro aŭstria.

Korespondantoj! Atentu!

Ĉiu el vi havas, kiel mi scias laŭ propra sperto, la deziron, posedi fotografiaĵojn de sia korespondanto aŭ -ino. Sed la kutimaj fotoj estas hodiaŭ tro multekostaj por tiu ĉi celo. Mi povos al vi liveri por tiu ĉi interŝanĝo tre malmultekostajn belajn vizitkartojn kun via fotografiaĵo.

Prezo por 100 kartoj kun bildo kaj nomo 30 mk., kun kompleta adreso 35 mk. Formato 95 : 45 mm. Farataj laŭ ĉiuj ajn fotoj, kiu estas resendata sendifekte. Livertempo 2-3 semajnoj. Alsendo per rekomendita letero.

Ferna-Versand, Plauen i. Vogtl., Germ.,
Antonstr. 31.

Unuakvalitaj fabrikaĵoj el
ŜTALO DE SOLINGEN
ĉiuspecaj ilaroj, brulligiloj, mezuriloj estas liverataj de speciala firmo
Reinh. Maier Ww., Freiburg i. Br.
Klarastr. 1, Germ.

Eksportkatalogoj disponeblaj.
En kelkaj landoj ni serĉas ankoraŭ reprezentantojn.

Grandkomercejo de Furnirligno.
Ligno (Surguitaĵoj)
Julius Reinmann & Co.
Germanio. Freiburg i. Br. Germanio.
Lignaĵoj.
Eksporto al ĉiuj landoj.
Reprezentantoj serĉataj.

Intarsioj.

Marketro-fabrikojn el ligno, perlamoto kaj metalo por fabrikoj de mebloj, horloĝoj je favoraj kondiĉoj liveras

H. Knaup, Artmetiejo por Intarsioj.
Karpfengasse 8, Heidelberg (Germanio)

Oni petu specialan proponon! Reprezentantoj serĉataj por ĉiuj landoj.

Monteys & Martinez, Barcelona (Hisp.)

Comercio 31-3-2.

Ni aĉetas je nia propra kalkulo kaj komisiio germanajn kaj aŭstrajn komercaĵojn. Estas preferindaj la jenaj artikloj:

Malplenaĵ
kverkbareloj. :: Kverk-
lignaĵoj. :: Diamantoj kaj brillantoj.
Oraĵoj. :: Artikloj por aŭtomobiloj. :: Materialoj por
aŭtomobil-kaleŝoj. :: Horloĝoj. :: Ledoj, silkaj
ŝtrumpoj kaj ŝtrumpetoj por sinjorinoj
kaj sinjoroj. :: Tolajoj kaj
teksaĵoj. :: Vitraroj
kaj tiel plu.

Hungara Ĝenerala Kreditbanko Budapest

■■■■■■■■■■

La plej granda hungara banko kun interrilatoj en ĉiuj landoj.

Akcia kapitalo kaj rezervofondoj: hung. kr. 9 000 000 000.

Kvin filioj en Budapest.

Filioj en: Brasso, Debreczen, Fiume, Győr, Kassa, Kecskemet, Nagyvarad, Pecs, Pozsony, Satoraljaiuhely, Szabadka, Temesvar.

Prizorgas ankaŭ ĉiujn banknegocojn por Slovakio kaj Transsilvanio per siaj tieaj filioj. Per ĝiaj entreprenoj eksporto kaj importo de diversaj artikloj!

Malkaraj Mebloj.

Korbmebloj riceveblaj el pola fabrikejo pogrande kaj detale. Kompleta salono, konsistanta el 6-10 pecoj (tablo, sofo, du foteloj, du seĝoj, unu tabor-eto, du flordestaloj kaj unu florujo) kun plenpako kostas 240-315 frankojn sv. antaŭpagotajn per kia ajn bankofico — loko pola limo. La firmo posedas permeson oficialan liveri siajn fabrikojn en ĉiuj ŝtatojn. Informojn donas kaj mendojn akceptas (tri fotogr. desegnojn nur kontraŭ alsendo de unu sv. fk.)

Prof. Miecz. Sygnarski, Bydgoszcz,
Kordeckiego 19. Ilp. Polonio.

Babcock-Wilcox
Akvotubo-Kaldronoj

por normala kaj tre alta vaporigo estas fabrikataj de

FRATOJ STORK & K-io
HENGELO (O) NEDERLANDO

: Fabriko kun pli ol 2000 laboristoj. :
— Esperanto korespondanta. —
Nur petoj de seriozaj firmoj estas konsiderataj.

Dezirante starigi ĉe mi en Katalunujo (francilima hispana regiono)
:: :: :: oficejon de :: :: ::

Reprezentoj por Esperanto

mi petas al ĉiuj firmoj kaj komercistoj esp. grupoj, bonvole transdoni al mi siajn reprezentantojn, sendante katalogojn, prezarojn kaj — se eble — specimenojn de novaj :: facile vendeblaj komercaĵoj. ::
Adresu: Konrado Doménech, Rambla Alvarez 12, 2-a etaĝo, :: Girono, Hispanlando. :: ::
Nur korespondado en Esperanto.

Jus aperis 3-a eldono de
BES-a Adresaro de Esperantistoj
el ĉiuj landoj

Bela praktika manlibreto, 90-paĝa, kun 1000 adresoj kaj ilustraĵoj. — Prezo 10.50 Mk. germ., aliande 1.50 Fr. sv., pagebla en poŝtmarkoj aŭ resp.-kup. Aliĝu tuj al 4-a eldono! — Enskriba kotizo 7 Mk. germ. (1 Fr. sv.), kun adresaro 10 Mk. germ., kun propra portreto 24.50 Mk. germ.

Anoncu en 4-a eldono!
1/4 pago 56 Mk. germ. (8 Fr. sv.). 1 linio 7 Mk. germ. (1 Fr. sv.)

Bohema Esperanto-Servo Moravany,
Bohemujo. Ĉeĥoslovakujo.
Reprezentanto por Germanujo:
Oskar Ziegler & K-io., Marktredwitz, (Oberfr.)

Anoncoj en „Esperanto Triumfonta“ estas legataj en pli ol 40 landoj de la tutmondo. Komercal ĉambroj favoraj al Esperanto skribu al ni por senpage ricevi nian ĵurnalon.